

## Krokodilismo kaj talpismo

Claude Gacond, 117-a radioprelego, 1965.12.29 & 1966.01.01

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond.

Por la naŭa fojo mi havas la privilegion partopreni la kunvivadon en la esperantista skirestado en Adelboden.

Privilegio, ne nur ĉar tiu restado permesas skii en vera paradizo. Privilegio, ne nur ĉar ni estas simpatia grupo, sed ĉefe privilegio, ĉar tiu dektaga kunvivado en primitiva alpa domo devigas nin partopreni la mastrumadon. Matene, antaŭ forlasi la hejmon, estas necese telerlavadi kaj purigi la ĉambrojn. Ĉiu ricevas funkcion kaj ĝin plenumas kun siaj ski-kamaradoj parolante nur en esperanto.

Vespere, post ski-aventuroj, ni ĉiuj havas multon por rakonti. La entuziasmo bezonas riĉan vortaron por sin komuniki. Kaj kiam oni falis post ŝuso sur spuroza deklivo kaj vidis centmil stelojn, tiam oni emas priskibi sian travivaĵon. Kaj ĉar ĉiuj spertis la samon, tiam la grupo muzikas je la sama diapazono.

Tiu atmosfero estas mortiga por la malamiko al nia lingvo : por la drako, kiu inside faras de bonintencaj samideanoj terurajn krokodilojn. Tiu kunvivado devigas nin plej rapide riĉigi la komunan radikaron. La komencantoj post kelkaj tagoj lerte ĵonglas per tiuj simplaj radikoj por esprimi siajn plej intimajn sentojn. Ilin aŭdante mi ofte repensas al la trafaj rimarkoj de Edmond Privat en *Esprimo de sentoj en Esperanto*.

En tiu skirestado esperanto estas vere vivanta lingvo. En ĝi oni senĉese ridegas, ŝvarcas (faras vortludojn kiel Schwartz), konstruas neatenditajn malvortojn... Brito foje notis aron da ili, por ilin prezenti en prelego al siaj lokaj grupanoj.

En tiu direkto estas ĉiujare progreso. Kiam mi pensas al la unuaj restadoj, kiam ni devis senĉese batali kontraŭ la krokodilado, tiam mi mezuras la marŝadon antaŭenan.

Tiu progreso estas instruiga. Ĝi bildigas la evoluon de nia afero. Unue ni estis kelkaj entuziasmaj esperantistoj. Ni grupiĝis en ege primitiva ĉaledo. La nuna ĉaledo ankoraŭ estas tre primitiva, do vi povas imagi la primitivecon de la unua. Kaj ni provis paroli. Preskaŭ ne estis eble. Senĉese mankis al ni vortoj. Dum la manĝoj ni ne povis esprimi la bonguston de la manĝaĵoj. Dum la skiado ni tute forgesis esperanton. Tamen ni estis bonaj esperantistoj. Skribe ni povis redakti malfacilajn tekstojn. Sed verkanto povas uzi la vortaron. Parolanto tion ne povas fari. Skribanto verkas laŭ temo. Temo decidas pri la vortaro. Parolanto ne elektas temon. La temo venas de si mem dum la babilado, sin trudas kaj pruvas nian nescion. Tiam la krokodilo nin kaptas : ni revenas al la nacia ĵargono.

Tiu situacio estas la ĝenerala situacio en loka klubo, kaj ofte en esperanta kongreso. En la oficialaj aranĝoj la programeroj disvolviĝas tre bone. Ĉiuj partoprenantoj kapablas ĉu silenti, ĉu sin esprimi en la zamenhofa lingvo. Sed en la koridoroj, en la manĝejoj, dum la promenadoj estas alia afero. La krokodiloj ofte svarmas. Kiam oni tion al ili rimarkigas, tiam ili havas ofte tiun ĉi pardon-peton : ni ripozas ! Jes ili ripozas, ĉar esperanto estas por ili ankoraŭ fremda lingvo. Malgraŭ la propagando, kiu asertas, ke la internacia lingvo estas facila.

Ekzistas du specoj da krokodiloj. Dum kongresa manĝo en La Chaux-de-Fonds mi devis sidi en la prezida loko. Tio signifas, ke mankis al mi vidalvidulo. Do preskaŭ ne eblis babiladi. Tiam mi aŭskultis kaj rigardadis. Mi observis la krokodilojn. Unuj estis komencantoj, kiuj kun entuziasmo provis sin esprimi por la unua fojo en tiu ĵus eklernata lingvo. Malfacila tasko. Pro tio, de tempo al tempo ili rapidis diri siajn impresojn en la hejma lingvo. Estis por ili kvazaŭ parentezoj en ilia babilado. Mi revidis la restadojn en Adelboden, kiam dum la unuaj jaroj ni batalegis kontraŭ la drakon. La aliaj krokodiloj estis tre diferencaj. Ili estis la esperanta superularo. Multon ili rakontis, sed preskaŭ ĉion en la nacia lingvo. Kaj kiel

## Krokodilismo kaj talpismo

Claude Gacond, 117-a radioprelego, 1965.12.29 & 1966.01.01

parentezoj ili uzis esperanton. La gravaĵojn ili diris france, kaj *servu vin, ĉu vi deziras ankoraŭ panon, la legomoj estas bonaj*, ili diris en la zamenhofa lingvo. Verŝajne ili eĉ ne konis la nomon de la tag-legomo en tiu lingvo. Zamenhof vere devis esti malkontenta.

Mi ankaŭ estis malkontenta. Mi komprenis multon. Kial nia lingvo kvazaŭ stagnis dum longaj jaroj. Kial ĝi ĉefe evoluas en la junularaj medioj. Kial dum intereseĝaj debatoj raras tiuj, kiuj sin riskas diri ion, kial post esperantisteco kvindekjara ili ankoraŭ devas sin ripozi de nia lingvo klaĉante nacilingve ?

La junuloj forĝis la esprimon krokodili en la TEJO-kongresoj Wörgl (1953) kaj Hilversumo (1954). Mi ĉeestis ilin. En Aŭstrio, por kritiki la krokodilantojn oni provis la esprimon « *ne ovu !* ». Ĉu kokino ovinta ne kantadas *kot kot kot !* Tio similas al lingvaĵo nekomprenbla. En Nederlando oni diris *krokodila buŝo*, aŭ eĉ *krokodila faŭko*. Estas verŝajne dum tiu kongreso, kie svarmis la nederlandaj krokodiloj, ke la esprimo reale naskiĝis. Rapide ĝi estis akceptita ĝis la ekstretoj de la mondo, ĉar ĝi respondis al lingva neceso.

Ĉasante al krokodiloj oni iom post iom rimarkis, ke en Esperantujo ekzistas alia stranga besto. La germanaj junuloj ĝin nomas **talpo**, kaj mi pensas, ke tiu esprimo ankaŭ ĝeneraligo.

Antaŭ la pordo de niaj kongresejoj ni do de nun metos ŝildon kun indiko, ne nur malpermesata al krokodiloj, sed ankaŭ al talpoj. Tiam la ĉuvideziraspanuloj venos al ni kun informemo pri tiu blinda kaj subtera besto.

Tre simple ni priskribos ilian portreton dum manĝo kaj promenado, sub la nomo de tiu besto. Mi esperas, ke ili pli bone komprenos, ol per la bildo de la krokodilo.

Se ili ne komprenas, tiam ili estas veraj talpoj. Tio signifas, ke kredante fosi belan sulkon, laŭ la verso, kiun ili ege ŝatas: « *Ni fosu nian sulkon* », ili montros, ke ili kontraŭe subfosas la fundamentojn de nia esperanta domo.

Krokodilismo estas infana malsano. Talpismo estas multe pli grava malsano. Mi eĉ timas pri ĝia nekuraĵo. Krokodilo estas ankoraŭ sufiĉe bela besto kun simpatia rido kaj grandaj larmoj. Sed talpo ! Nur la felo estas admirinda. Pri la resto : formo kaj laboro ni silentu !

Krokodilismon ni povas iom post iom flegadi organizante skirestadojn. Talpismon ni nur povos flegadi malfermante talpejojn.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo kaj bonan novan jaron !

-oOo-